


BRAZILA ESPERANTISTO

71-a Jaro

Julio-Septembro 1977

760-762



ANTI-KVAJ PEJZAGOJ DE RIO DE JANEIRO

Paço Real (Rêga Palaco) aktuala Placo 15 de Novembro

Grava monumento devenanta de la 18-a jarcento, ĝi estis konstruita por loĝado de la vicreĝoj kaj poste adaptita al Imperiestra Palaco. Nuntempe ĝi estas la sidejo de la Departemento de Poŝto kaj Telegrafo ĉe Placo 15 de Novembro, loko, kiu ankoraŭ konservas plurajn trajtojn de la primitiva pejzaĝo. (Laŭ bildo de Desmons.)

Serviço de Livros

	Cr\$
Hamleto, Shakespeare. Trad. Zamenhof.	60,00
Hamleto, Princo de Danujo, Shakespeare. Trad. L. M. Newell	40,00
Historio de Nederlando, A. da Silva. Trad. J. de Freitas Martins.	5,00
Hermano kaj Doroteo, Goethe. Trad. B. Küster.	10,00
Historio de Usono, A. da Silva. Trad. J. de Freitas Martins.	5,00
La Homaro kaj la Mondbildo, Martinus.	15,00
Ifigenio en Taŭrido, Goethe. Trad. Zamenhof.	50,00
Infantoj ne konas limojn, Sam Wagenaar. 110 belas fotos de crianças de todo o mundo.	15,00
Inter du Mondepokoj, Martinus.	15,00
Insuloj de Feliĉuloj, August Strindberg. Trad. Oskar Forde. Novela.	5,00
La Instituto Milner, Jean Julien. Brochura sobre a casa de tratamento do Dr. James Milner.	5,00
Internacia Kantaro, Paul Benne- mann, 139 canções populares de 55 países.	10,00
Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro en 9 Lingvoj.	550,00

Liga Brasileira de Esperanto Assembléia Geral Ordinária

Convocação

Ficam convidados os Srs. Membros da Diretoria, Membros dos Conselhos e Sócios para a Assembléia Geral, a realizar-se no dia 17 de dezembro de 1977, às 16,30 horas, na sede social, na Praça da República, 54, 2.º and. Rio de Janeiro, RJ.

Rio de Janeiro, 1.º de novembro de 1977.

Luiz Alberto Martins
Presidente

Quota anual de adesão à Liga Brasileira de Esperanto 1978

	Cr\$
M1 além das vantagens de sócio recebe a carteira de sócio e o Brazilia Esperantisto	150,00
M2 recebe o mesmo que o M1. Paga uma quota mais alta para auxiliar a B.E.L. e o movimento	300,00
Essas quotas correspondem ao ano civil.	

Todas as importâncias devem ser remetidas, em cheque pagável no Rio de Janeiro, ou vale postal, em nome da **Liga Brasileira de Esperanto**: Praça da República, 54 — 2.º andar, 20.000 Rio de Janeiro, R.J.

Julio — Setembro 1977

71-a Jaro

N-ro 760-762

Brazilia Esperantisto
("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de **Brazilia Esperanto**
Ligo, societo de publika utileco, laŭ registara dekreto n-ro 4.356, 26-10-1921.

Respondeca redaktoro: Luiz A.B. Martins

Redaktoroj: Joel Manso kaj Floriano Pessoa

Administracio kaj Redakcio:
Praça da República, 54, 2.º
20.000 Rio de Janeiro - RJ, Brazilo

Senpaga por anoj de B.E.L.
Eksterlande: 15 respondkuponoj.

Liga Brasileira de Esperanto Taxas dos Cursos

Curso Elementar — Contribuição única: 60% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição, o restante com a remessa da 8.ª lição.	250,00
Curso Superior — Contribuição única: 50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição, o restante, com a remessa da 10.ª lição.	300,00
Curso Magistral — Contribuição única: 50% desse valor deverá ser remetido com o pedido de inscrição, o restante com a remessa da 10.ª lição.	400,00

Esperanto kiel faktoro en la moderna vivo

Janos Hamvai

Mi konfesas, ke mia titolo "Esperanto kiel faktoro en la moderna vivo" estas iom pretendema. Ĉar tiu ĉi temo estas tiel larĝa, ke simple neblas pritrakti ĝin en kadro de mallonga eseo. Tial ni, kompreneble, nur tuŝas tiun ĉi temon de du flankoj de la vivo.

Ni ĝenerale akceptas, ke la vivo konsistas el konscia intelekto, la **spirito**, kaj el ties kontraŭaĵo, la **materio**. Ilia kunan, komunan agadon, senĉesan aktivadon ni nomas **vivo**.

Ankaŭ Esperanto vivas kaj efikas sur ambaŭ terenoj, sur la spirita kaj sur la materia. Ĝi estas la rezulto de la genia spirito de Zamenhof.

Ne necesas nun prezenti kion kaj kiom kreis li krom la lingvo kaj per la lingvo, ni ja ĉiuj bone scias tion. La Verkaro de Zamenhof parolas pri tiuj ĉiuj.

Kompreneble, dum la zamenhofaj tempoj Esperanto efikis pleje aŭ preskaŭ nur, sur la spirita tereno de la vivo. Ĝi devis kreski, disvastiĝi kaj pruvi, ke ĝi estas taŭga ilo por la interkomunikado de la nacioj. Kaj tial ĝi evoluigis en la unua periodo grande en la unua periodo grande en la noblaj sferoj de la literaturo: poezio kaj belestro. Aperis unu post la alia talentaj disĉiploj kiel Grabovski, Kabe, Beaufront, Couŝurat, kaj alme-

naŭ dekduo da eminentaj diversnaciaj poetoj kaj aŭtoroj.

Post la unua mondmilito aperis en la Esperanto-literaturo du grandaj talentoj en Hungarujo: Kalocsay kaj Baghy. Ni ne deziras ĉi tie doni literaturan prezentadon, nur menciigi tiujn ĉi du, sed kiel elstara kometo post Zamenhof, sur la ĉielo de Esperanto estas Kalocsay.

Ni trankvile kaj firme povas aserti, ke la tuta, nun jam impona kaj belega konstruaĵo de Esperanto ripozas sur la du plej potencaj kolonoj: Zamenhof kaj post li Kalocsay! Ili ambaŭ konstruis ĉefe la spiritan flankon de unu el la geniaj eltrovaĵoj de la homaro. Kion Zamenhof kreis, tion Kalocsay evoluigis, pligrandigis kaj pliperfektigis, ĝis mirinda grado. La tutmonda esperantistaro funebriĝis lian forpason pasintjare.

Kiel ni jam menciis, spirito kaj materio kune laboras. Post la bonegaj rezultoj en la mondo de l' spirito Esperanto ekenpenetris ankaŭ la materian mondon. La internacia komerco kaj industrio komencis apliki la Internacian Lingvon pleje ĉe reklamado, propagando kaj komerca korespondado. Bedaŭrinde, tiuj ĉi klopodoj eĉ ĝis nun restis ĉefparte nur eksperimentoj, sed ni, adeptoj de la lingvo, estas kaj devas esti dankaj, precipe al tiuj kelkaj mondkonataj entreprenoj,

kiuj sisteme aplikas ĝin konstante, ne rigardante la momentan materian gajnon pere de ĝi, sed konvinkite, ke ĝi estas la lingvo de la proksima futuro por la praktika, moderna, materia mondo.

Esperanto jam tre bele penetris en la mediojn de la literaturo, edukado kaj komerco, sed ne tiom ankoraŭ en la plej gravan praktikan sciencon, kiu regas la modernan vivon: en la Teknikon.

Sandor Szatmary, la eminenta Esperanto-verkisto, kiu forpasis antaŭ du jaroj, estis ankaŭ eminenta maŝinĝeniero, kiu forte pledis por "Esperanto kiel lingvo de la moderna tekniko". En sia samtitola eseo li diras, ke jam estas la lingvo de la proksima futuro por teknika vortaro — oficiala. Komencaj provoj jam ekzistas, sed la tereno tiel vastas, ke ankoraŭ multego estas farenda. La malgrandaj nacioj, se ili volas sampaŝe progresi kun la gvidaj, grandaj, ili devas (devus) uzi la anglajn, francajn, germanajn, rusajn fakvortarojn, kaj tio enorme malhelpas iliajn klopodojn.

Precipe la angla lingvo abundas je homonimoj. El inter la miloj li donas unu ekzemplon: La angla vorto "peg" havas 25 signifojn: najlo, stifto, tenono, ŝtopilo, paliso, kordostreĉilo, signalstango, mineja apogtrabo, navedo, proteza kruro, preteksto, vesthoko, eskala ŝtupo, piedo de violonĉelo, flaseto da brando.

Kompreneble, alilingvaj teknikistoj fariĝas tute konfuzitaj antaŭ tia riĉeco de unu lingvo. Sed ili volas kaj devas studi kaj vidi la progreson aŭkaj de aliaj grandaj nacioj, sed simple neeble!

Por la botaniko kaj zoologio ekzistas unueca, preciza, nemiskomprenebla latina nomenklaturo. Kial ĝi ne ekzistas por la tekniko, kiu hodiaŭ estas la plej grava inter ĉiuj sciencoj? Kaj vere tiu ne ekzistas, sed kial? Ĉar ankaŭ dum la romia imperio vivis la samaj vegetaĵoj kaj vestoj, kiuj hodiaŭ. Vivis hundo, ĉevalo, leono, lupo, elefanto; vivis rozo, dianto, akacio kaj kverko, sed ne estis televido, filmo, ferbetono, alttensio, elektra

kondensatoro, dizel-lokomotivo, elektra amplifilo. Do: por botaniko kaj zoologio tre taŭgas la "staranta" latina lingvo, sed ne por la ĉiam progresanta tekniko.

Ĉu iu volas aŭ ne volas akcepti, la fakto estas, ke hodiaŭ la plej ampleksa kaj grava scienco, kiu fundamente influas kaj determinas la modernan vivon, estas la tekniko. Sed la evoluon de la tekniko forte malhelpas la malstrikteco de la terminoj kaj precize la manko de strikta, internacia terminaro.

Por tiu ĉi celo ne taŭgas la antikvaj, arkaikaj lingvoj, sed des pli kaj unusole taŭgas Esperanto, la plej juna, pleje progresigebla lingvo. Nia lingvo estas la plej fleksbla. Esperanto havas nur 29 finaĵojn, sed per tiuj 29 finaĵoj ĝi povas esprimi multe pli da nuancoj, ol la franca, kiu havas multegajn.

La plej grava argumento de la Esperanto-nekonantoj estas, ke ĝi estas artefarita lingvo, kvankam jam pasintjarcente kelkaj anglaj kaj germanaj lingvosciencistoj, inter ili ankaŭ Karl Marx, pruvis, ke ankaŭ la naciaj lingvoj ne estas naturaj lingvoj, sed rezultoj de tre multflankaj kaj multspecaj influoj. Ni ja bone scias, ke la fundamento de la angla lingvo konsistas el normaj, keltaj, gotaj, ĝermanaj, grekaj kaj latinaj elementoj, respektive el ties kunfandaĵoj. Kaj pli-malpli simile estas kun ĉiuj naciaj lingvoj.

Ĉu la artefariteco estas kondamninda, tion tre trafe ilustras tiu ĉi anekdoto: Azeno rigardas aŭtomobilon kaj diras: — Jes, ĝi estas pli komforta ol mia dorso. Ĝi estas vere pli rapida ol miaj piedoj, sed ĝi estas bedaŭrinde artefarita!

Saluton, Amiko!

Publicado pela Kanada Esperanto-Asocio
Vocabulário sobre os principais esportes
preparado para as Olimpíadas de 1976
Tradução em francês, inglês e português

Cr\$ 55,00

Sed ne nur la angla lingvo havas multajn homonimojn, ankaŭ hungara kaj aliaj. Por ekzemplo el la hungara lingvo nur unu vorto: "ved". Tiu signifas defendi, ŝirmi, pledi kaj protekti. En Esperanto troviĝas apartaj vortoj por ĉiuj kvar signifoj. Kaj tamen Esperanto havas la plej malmultajn vortojn. Kiel povas ekzisti tiu ŝajna kontraŭdiro? Pro la artefariteco! Ne nur la malriĉa hungara lingvo, sed ankaŭ la angla lingvo per sia miliono da vortoj ne povas tiom da nuancoj esprimi, kiom Esperanto per ĉirkaŭ dekmil vortoj. La naciaj lingvoj jam ne povas evolui kune kun la rapidega evoluo de la tekniko.

Ni povas jam fieri, ke nun kelkaj — eĉ el la plej grandaj kaj eminentaj fabrikoj kaj komercentreprenejoj de la mondo jam depost jaroj aplikas Esperanton en sia reklamado kaj negoco. Ili estas certe ekzemplo por la tuta mondo.

Resumante: 1-e) La teknika evoluo ege bezonas sciencan lingvon kaj por tiu celo taŭgas nur Esperanto. 2-e) Por tiu celo nia tasko estas ne nur propagandi, sed ankaŭ plitaŭgigi nian lingvon, por ke ĝi senerare povu esprimi ĉiujn teknikajn konceptojn. La oficialigo de Esperanto estas tre malfacila. Ni multe devos ankoraŭ batali kontraŭ miopaj naciaj ĵaluzemoj. Sed la tekniko jam ege bezonas nian lingvon. Tiu ĉi estas la plej aktuala, kaj tial la plej facila vojo, per kiu ni povas enpenetri en la komunan vivon, kaj se tio ĉi realiĝos, la ceteraj paŝoj jam ne estas prokrasteblaj.

(Prelego farita dum la 42-a Nov-Zelanda E-Kongreso, Auckland, Jan. 1977, kaj publikigita en "The Australian Esperantist", Mar. 1977).

A LÍngua Internacional
E. Breitenbach

Cr\$ 5,00

POR PAROLI ESPERANTON KUN LA TUTA MONDO

Ekzistas tutmonda klubo de homoj, kiuj deziras korespondi per sonbendoj aŭ kasetoj. Tiu klubo havas sian sidejon en Usono, sed ĝiaj membroj laĝas en 34 landoj. Inter tiuj, estas ankaŭ esperantistoj, kio jam estas interesa por ni. Sed la intereso estus ankoraŭ pli granda, se multaj esperantistoj partoprenus en tiu mondskala rondo. La jarkotizo estas tre malalta (nur kvar dolarojn) kaj kontraŭ tiu sumo, ĉiu membro ricevas: kompletan adresaron de ĉiuj membroj en la tuta mondo (la lasta havas 64 grandajn paĝojn) kaj ĉiun trian monaton, interesan gazeton en la angla lingvo, kiu enhavas suplementon kun adreso de la novaj membroj. Mi ne dubas, ke se ĉiuj esperantistoj scius, ke tiu klubo ekzistas, preskaŭ ĉiuj, kiuj posedas magnetofonon, aliĝus al ĝi, kaj tio havus du avantaĝojn: unue, multaj esperantistoj povus "parole" interkonatiĝi; due, la ceteraj membroj de la klubo, ĝis nun ne esperantistoj, konstatus, kiom disvastigata estas la uzo de Esperanto kaj multaj, serĉantaj homan kontakton sed ĝenataj per la lingvaj baroj, eklernus Esperanton kaj venus al niaj vicoj. Cetere, por la esperantistoj kapablaj paroli aliajn lingvojn, tio estas facila maniero fari propagandon por Esperanto en medion tute pretan akcepti ĝin. Tiu klubo nomiĝas "The Voicesspondence Club". Tiu vorto signifas "Voĉa korespondado", el la angla vorto "voice" (= voĉo). La fakto, ke la adresaro kaj la kvaronaraj bultenoj estas en la angla, ne devas esti baro por la esperantistoj, kiuj ne scipovas ĝin, ĉar mi proponis al la sekretario de la Klubo esperantistan kunlaboradon, kiun li entuziasme akceptis. Mi estas preparanta esperantlingvan tradukon de la dokumentoj de la Klubo, kiun la peranto por Eŭropo multoblighos por

la esperantistoj. Ili ja estas tute pretaj akcepti nin: tiun okazon ni ne devas preterlasi! Tial mi konsilas al vi aliĝi al tiu tre interesa klubo kaj profiti ĝiajn servojn. Tion vi certe ne bedaŭros!

Se vi deziras pliajn informojn, vi povas unue turni vin al: S-ro Daniel Luez, 1, rue Victor-Faglain, F02000 Laon, Francujo.

BRAZILAJ ŜAKISTOJ

Laŭ informo de S-ro José Carlos Gonçalves Vieira, li estas la brazila peranto de Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŜLI).

Laŭ la statuto, EŜLI celas grupigi ĉiujn ŝakistojn, kiuj scipovas Esperanton kaj ebligis al ili amikajn ŝakajn rilatojn, propagandi Esperanton inter ŝakistoj en la tuta mondo.

Brazilaj ŝakistoj dezirantaj pliajn informojn bonvole skribu al: S-ro José Carlos Gonçalves Vieira, SQS 305, Bl F, ap. 402, Brasília, DF.

LETEROJ DE LA LEGANTOJ

A. Holzhaus, Indiana, Usono — Mi tralegis "Brazilan Esperantiston" (757-759) kaj en la artikolo "Verkoj de L. Zamenhof" sur p. 9, linio 15, mi trovis eraron: anstataŭ en 1904 devas esti en 1905.

NEKROLOGO

Jatyr Gonçalves Vieira

São João da Boa Vista — Mortis pro aŭtomobila akcidento D-ro Jatyr Gonçalves Vieira kaj ties edzino. Li estis kuracisto kaj dum longa tempo membro de B.E.L. Tre konata en sia urbo, D-ro Jatyr multe helpadis la malriĉulojn per donacoj de kuraciloj, vestoj kaj ŝuoj. Longan tempon li faris kampajnon kontraŭ tabak- kaj alkoholuzado.

Brazila

Kroniko

Bahia

Ihêus — Nia samideano Elêus Leonardo de Sá sendis al ni ekzempleron de "Tribuna dos Municípios", n-ro 2, Salvador, BA, en kiu li publikigis artikolon pri Esperanto.

Ceará

Fortaleza — En Decembro 1976, aperis "Fenikso", bulteno de la junularo de Ceará. Adreso: Caixa Postal 1221, 60.000 Fortaleza, CE.

Rio Grande do Sul

Rio Grande — En la 30-a de Aprilo pasinta, en la urbo Rio Grande, okazis renkontiĝo de esperantistoj el Porto Alegre, Pelotas, Jaguará kaj Piratini. La programo konsistis el vizito al Oceanografia Muzeo, el tagmanĝo kaj arthoro prezentita de la ĥoro de la Esperantista Societo de Pelotas. Entute partoprenis 43 esperantistoj.

Rio de Janeiro

Niterói — D-ro Joaquim do Couto, prezidanto de Niterói Esperanto-Klubo kaj konsilanto de B.E.L., sendis al ni eltondaĵon de la skolta ĵurnalo "O Guia" kun informo pri Brazila Esperanto-Ligo.

Pernambuco

Olinda — S-ro Arnon Ribeiro Vasconcelos regule publikigas informojn pri Esperanto en la bulteno "Pernambuco Espírita".

Recife — Ni danke ricevis numeron de "Boletim" de Associação Pernambucana de Esperanto, en kiu oni legas, ke dum la monato Aŭgusto pasinta komenciĝis 5 (kvin!) elementaj kursoj de Esperanto.

Sabate, en la sidejo de A.P.E., okazas vigla aktiveco, de la 3-a posttagmeze ĝis la 8-a vespere.

GAETANETO (1)

Alcântara Machado

— Ha, Gaetaneto, kiel bone estas!

Gaetaneto enpenŝiĝis ĝuste en la mezo de la ŝoseo. "Ford" (2) preskaŭ faligis lin, sed li ne vidis la Ford'on. Ĉaristo diris al li parolaĉon, sed li ĝin ne aŭdis.

— He, Gaetaneto! Venu hejmen.

Patrinan krion eĉ surda filo aŭdas.

Li turnis la vizaĝon tiel malbelan pro lentugoj, vidis sian patrinon kaj vidis la pantoflon.

— "Subito"! (3)

Li alproksimiĝis malrapide, tre malrapide. Paŭtante. Studante la terenon. Antaŭ sia patrino kaj la pantoflo li haltis. Li ŝvingis sian korpon. Rimedo de futbala ĉampiono. Li ŝajnis iri dekstren. Sed li tuj turniĝis kaj eniris maldekstren tra la pordo.

Majstra ludmovo!

□ □ □

Tie ĉe strato Oriento, la popolaĉo ĉe la plej bona okazo veturis per tramo. Per aŭtomobilo aŭ kaleŝo nur ja en tago de enterigo. De enterigo aŭ geedziĝo. Ĝuste pro tio la revo de Gaetaneto estis tre malfacile realigebla. Aŭtomobilo.

Beppino (4) ekzemple. Beppino tiun vesperon trairis la urbon aŭtomobile. Sed kiel? Post onklino Peroneta, kiu transloĝiĝis al Araçá (5). Tiel certe ne estis profite.

Sed se ĝi estus la sola rimedo? Pacienca.

□ □ □

Gaetaneto metis la kapon sur la kusenon.

Kiel bele, knabo! Antaŭe, kvar nigraj ĉevaloj kun plumfaskoj kondukis onklinon Filo-

mena al la tombejo. Poste, la pastro. Poste, Savério, ŝia fianĉo, kun la naztuko ĉe la okuloj. Poste li. Sur la sidloko de la vertugisto. Ĉe lia flanko. Kun la marista vesto kaj la blanka ĉapo, kie oni legis "Kirasŝipo São Paulo". Ne. Li fariĝus pli bela en la marista vesto kun la nova pajla ĉapeleto, kiun lia frato portis el la fabriko. Kaj nigraj ligiloj tenantaj la ŝtrumpetojn. Kiel bele, knabo! Ene de la kaleŝo lia patro, du fratoj pli aĝaj (la unua kun ruĝa, la dua kun verda kravato) kaj lia baptopatro, sinjoro Salomone. Multaj personoj sur la trotuaroj, ĉe la pordoj kaj ĉe la fenestroj de la luksaj domoj, rigardante la funebran procesion. Precipe admirante Gaetaneton.

Sed Gaetaneto ankoraŭ ne estis kontenta. Li volis teni la vipon. La malŝatinda veturigisto ne permesis. Eĉ dum unu momento.

Gaetano estis krinta, sed onklino Filomena, pro sia manio kanti "Ai Marí!" ĉiumatene, vekis lin.

Unue li ĉagreniĝis. Poste li preskaŭ ploris pro kolero.

□ □ □

Onklino Filomena havis nervatakon, kiam ŝi eksciis la sonĝon de Gaetaneto. Tiel fortan, ke li sentis konscienciproĉon. Kaj por la trankvileco de la familio alarmita pro la malbona aŭguro, li tuj zorgis pri la anstataŭigo de la onklino per alia persono.

Li longe pripensis kaj elektis la lumigiston de stratlampoj de la gaskompanio, sinjoron Rubino, kiu iam donis al li teruran survertan baton.

Kiam liaj fratoj ekkonis la rakonton, ili decidis riski kune kvincent rejsajn (6) pri elefanto (7). Gajnis la bovino. Kaj ili koleriĝis, ĉar ili ne tuj divenis, ke nur la bovino estas gajnanta.

La futbala ludo sur la trotuaro ŝajnis esti decida pri vivo au morto. Malgraŭ tio Gaetano ne ĝin atentis.

— Ĉu vi konis la patron de Alfonso Beppino?
— Mia patro batis lian vizaĝon.
— Do vi ne iros morgaŭ al la enterigo. Mi iros!

Vicento protestis indigne:
— Tiamaniere mi ne plu ludos! Gaetano malhelpas!

Gaetano revenis al sia pozicio de golulo. Tiel plena de respondeco.

Nino alvenis kune kun la ŝtrumpa pilko (8). Li alvenis tre proksimen. Kun la torso kurbigita, la kruroj en fleksiĝo, la brakoj etenditaj, la manoj malfermitaj, Gaetano pretiĝis por la defendo.

— Pasigu al Beppino!

Beppino faris du paŝojn kaj piedbatis la pilkon. Kun la tuta forto. Ĝi transpasis la lentugan golulon kaj haltis sur la ŝoseo.

— Piedbatu en la infero!
— Tenu la buŝaĉon, palestrano! (9)
— Prenu la pilkon!

Gaetano ekkuris. Antaŭ ol li atingis la pilkon, tramo frapis lin. Frapis kaj mortigis lin.

En la tramo venis la patro de Gaetano.

La knabaro timoplena disvastigis la novaĵon vespere.

— Ĉu vi scias pri Gaetano?
— Kio okazis?
— Li fuŝbatis la tramon!

La najbararo purigis per benzeno siajn dimanĉajn vestojn.

□ □ □

Je la 4-a vespere en la posta tago, eliris funebra procesio el strato Oriento kaj Gaetano veturis sur la veturigista sidloko de neni el la akompanantaj kaleŝoj. Li veturis en tiu antaŭiranta, en fermita ĉerko kun malriĉaj floroj supre. Li portis la maristan veston, surhavis la ŝtrumpligilojn, sed ne surmetis la pajlan ĉapelon.

Kiu sur la veturigista sidloko de unu el la

kaleŝoj de la eta sekvantaro montris belegan kompleton ruĝan, kiu impresis la okulojn de la ĉeestantoj, tiu estis ja Beppino.

*El la portugala lingvo
tradukis Walter Francini*

- (1) "Caetano" estas brazila virnomo. "Gaetano" estas la itala responda formo. La rakonto temas pri infanoj de "Brás", kvartalo en la urbo São Paulo, kie loĝis multe da italaj elmigrintoj.
- (2) "Ford", komerca marko de aŭtomobilo, iam tre populara en Brazilo.
- (3) "Subito", kun akcento sur la antaŭlasta silabo, estas itala vorto signifanta "tuj", "mi iros tuj".
- (4) "Beppino", karesa formo de la itala virnomo "Giuseppe", "Jozefo". Ĝi respondas al "Joĉjo".
- (5) "Araçá", nomo de malnova tombejo en la urbo São Paulo.
- (6) "Rejso", malnova eta monunuo en Brazilo. Anstataŭ ĝi, oni uzas nun "centavo".
- (7) "Riski pri elefanto" — esprimu el la "bestludo", speco de loterio iam tre populara en Brazilo, en kiu la numeroj respondas al difinitaj bestoj.
- (8) "Ŝtrumpa pilko", utiligata de malriĉaj knaboj, estas pilko farita el eluzita virina ŝtrumpo.
- (9) "Palestrano", simpatianto de populara fulbala teamo en São Paulo, kies malnova nomo estis "Palestra Italia", kaj nun nomiĝas "Palmeiras".

*

Serviço de Livros

Internacia Mondregno Kreiĝanta , Martinus.	15,00
La Intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo , A. de Vigny. Trad. S. Meyer.	5,00
Islandaj Pravoĉoj , B. Ragnarsson.	30,00
Italaj Rakontoj , E. de Amicis.	10,00
Jen la Kanto de l' Vojaĝ'. Coletânea de canções populares.	15,00
Johano kaj Silvio , F. F. Betts.	5,00
Jolanto , H. Hertz.	10,00
Jozefo , J. D. Applebaum. Poema dramático em 4 atos.	25,00
La Jubilea Kongreso de Esperanto (1912).	5,00
La Juda Stato , T. Herzl. Trad. do alemão.	15,00
Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj. Informações sobre a Iugoslávia. Ricamente ilustrado.	15,00
La Juna Vivo. Internacia Kantaro. Letras de canções internacionais.	15,00

ZILBERNIK – UNUA MECENATO DE ESPERANTO

La ĝisnunaj biografioj de Zamenhof nenion parolas pri Aleksandr Zilbernik, bopatro de Zamenhof. Adolf Holzhaus, senlaca laboranto por Esperanto, kolektis materialon pri li, verkis la ĉi-suban biografion kaj sendis ĝin speciale por "Brazila Esperantisto".

Aleksandr Lejboviĉ Zilbernik naskiĝis en 1831 en Vieksniai, distrikto de Vilno, Rusujo, mortis la 25-an de Marto 1906 en Varsovio, Rusujo. Lia patro, Lejb Ŝah, estis libera rabeno en la hebrea komunumo. La familian nomon Zilbernik ricevis pro jena okazintaĵo: Por eviti militservon liaj gepatroj turnis sin al la seninfanaj gepatroj Silberfenig kun peto, ke ili adoptu la infanon (laŭ la rusaj leĝoj la sola filo en la familio estas libera de militservo). La rusa oficisto enskribis infanon Ŝah erare: anstataŭ Silberfenig Silbernik. Infano lernis en Jeŝivot (Supera rabena lernejo) kaj per meminstruado li lernis rusan kaj germanan lingvojn. Li edziĝis kun la filino Hadasa de la riĉa kaj honesta familio Bjeloŝ en Bjelostok, Rusujo, poste li translokiĝis en urbon Kovno kaj kune kun J. Ŝĉeranskij fondis fabrikon de sapo, kiun ili ankaŭ gvidis 47 jarojn en plena harmonio. Zilbernik havis kvar filojn kaj kvin filinojn. La plej juna filino Klara (6 Okt. 1863-6 Dec. 1924) edziniĝis la 9-an de Aŭgusto 1887 kun L. Zamenhof. L. Zamenhof finis la kreadon de Esperanto en 1885 kaj dum du jaroj vane serĉis eldoniston. Neniu volis aŭdi pri Esperanto, ĉar ekzistis jam lingvo Volapük, neniu volis riski eĉ malgrandan sumeton da mono, por eldoni la unuajn malgrandajn broŝuretojn de Esperanto en la rusa, pola, franca, germana, angla lingvoj. Zilbernik donis 10000 rublojn, kiujn Zamenhof elspezis por la presado de Esperantaj lernolibroj kaj ilia senpaga dissendado al lernejoj, profesoroj, kuracistoj, diversaj societoj, por multaj anoncoj en diversaj gazetoj ktp. En 1888 al Marko Zamenhof,

patro de L. Zamenhof, minacis granda puno. Por eviti la punon L. Zamenhof donis al sia patro restintajn 5000 rublojn kaj mem restis sen mono. Zamenhof savis patron, sed mem ruiniĝis por ĉiam. La enspezoj de L. Zamenhof estis tiel malgrandaj, ke ili kovradis nur parton de liaj plej necesaj kaj plej modestaj elspezoj. A. Zilbernik subtenadis sian bofilon Zamenhof dum 15 jaroj. Li subtenadis ne sole materiale, sed ankaŭ morale: tuj post apero de Esperanto-libro (26 Julio 1887) li ellernis Esperanton perfekte, malgraŭ sia ne-juna aĝo; li konsoladis ĉiam sian bofilon, kiam la esperoj de tiu ĉi lasta komencis malfortiĝadi. Li havis ĉiam grandan amon kaj intereson por la afero Esperanta, kaj la lastaj libroj kaj gazetoj, kiuj trovis sin sur la skribotablo antaŭ lia morto, estis Esperantaj.

A. Zilbernik estis unua mecenato de Esperanto. Al Zilbernik esperantistoj multe ŝuldas, ke Esperanto aperis en la mondon, ke ĝi povis trapasi la plej malfacilajn jarojn de sia ekzisto. Sen A. Zilbernik Esperanto hodiaŭ ne ekzistus en la mondo.

Novidade!

Plástico adesivo para automóveis, vitrines, etc., com a palavra "Esperanto", com letras verdes e fundo branco. 7 x 25 cm

Preço: Cr\$ 5,00

Lingva Rubriko

Pequeno Vocabulário Fotográfico

A

Abertura, aperturo.
Ampliação, pligrandigo; pligrandaĵo.
Ângulo, angulo.

B

Banheira, kuveto.
Banho, bano.
— **fixador**, fiksano.

C

Câmara, kamero; fotografilo.
— **ajustável**, alĝustigebla fotografilo.
— **automática**, aŭtomata fotografilo.
— **caixão**, kestforma fotografilo.
— **de fole**, fotografilo kun balgo.
— **escura**, senluma kamero.
— **miniatura**, miniatura fotografilo.
— **reflex**, reflekspegula kamero.
— **rígida**, nealĝustigebla fotografilo.
— **semi-automática**, duonaŭtomata fotografilo.

Campo, kampo.

Profundidade de —, kampa profundeco.

Claridade, lumeco.

Composição, konsisto; konsistigo; aranĝo.

Contraste, kontrasto.

Cópia, kopio.

— **por contacto**, kontakta kopio.

— **passada**, superekspozita kopio.

Corte, elimino; elekto.

D

Densidade, denseco.

Diafragma, diafragmo.

Abrir o —, malfermi la diafragmon.

Fechar o —, fermi la diafragmon.

Diapositivo, diapozitivo.

Disparador, elklilo.

Distância, distanco; interspaco.

— **focal**, fokusa distanco.

Distorção, distordo.

E

Enfocar, enfokusigi

Enquadramento, enkadrigo.

Equipamento, ekipaĵo.

Esfumado, laŭgrade ekforigita;
laŭgrada ekforigo.

Expor, eksponi.

Sub—, subeksponi.

Super—, supereksponi.

Exposição, ekspon(ad)o.

Dupla—, duobla ekspono.

F

Filme, filmo.

— **colorido**, kolora filmo.

— **em chapa**, platfilm.

— **em rolo**, rulfilm.

— **preto e branco**, blankanigra filmo.

Filtro, filtrilo.

Flash, fulmolampo.

— **eletrônico**, elektrona fulmolampo.

Focalização, enfokusigo.

Focalizar, enfokusigi

Foco, fokuso.

— **fixo**, malĝustigebla fokuso.

Fole, balgo.

Foto-flood, fotografia lampo.

Fotografar, fotografi.

Fotografia, fotografiaĵo; fotografio.

Fotógrafo, fotografisto.

Fotômetro, lummezurilo, fotometro.

Fraco, maldensa, hela.

G

Granulação, grajnigo.

H

Halo, haloo.

I

Iluminação, lumigo.

— **frontal**, fronta lumigo.

- lateral, flanko lumigo.
- oblíqua, oblikva lumigo.

Instantâneo, momenta, maldaŭra; momenta fotografado; momenta fotografaĵo, ekfotografaĵo.

L

Laboratório, laboratorio.

Lente, lenso; lensaro.

- de aproximação, alproksimiga lenso.

Luminosidade, lumeco.

Luz, lumo.

- ambiente, ekzistanta lumo.
 - artificial, artefarita lumo.
 - do dia, natura lumo.
 - refletida, reflektita lumo.
- Contra-luz**, kontraŭlumo.

M

Máquina fotográfica, fotografilo

Natureza, naturo.

- morta, senvivaĵo.

Negativo, negativo; negativa.

- coberto, densega negativo.
- duro, densa negativa.
- fraco, maldensa negativo.

N

Número, numero.

- guia, gvidnumero.

O

Objetiva, objektivo.

- grande angular, grandangula

objektivo.

- varifocal, varifokusa objetivo.

Tele—, teleobjetivo.

Obturador, obturilo.

Operar, funkciigi.

P

Paisagem, pejzaĝo.

Papel, papero.

- brilhante, brila papero.
- linho, lineca papero.
- mate, senbrila papero.
- semi-brilhante, duonbrila papero.
- semi-mate, duonsenbrila papero.
- rugoso, malglata papero.

Paralaxe, paralakso.

Para-sol, lumŝirmilo.

Placa, plako.

Plano, plano.

- focal, fokusa plano.

Ponto, punkto.

- de vista, vidpunkto.

Pose, pozo.

Positivo, positivo; positiva.

Propulsor, pusilo.

- automático, aŭtomata puŝilo.

Q

Quarto, ĉambro.

- escuro, senluma ĉambro.

R

Refletor, reflektilo, reflektoro.

A G U A R D E M !

VOCABULÁRIO

PORTUGUÊS-ESPERANTO

ESPERANTO-PORTUGUÊS

de

Carlos Domingues

Duas obras reunidas num só volume. Elaboradas pelo eminente Carlos Domingues, ex-presidente da Liga Brasileira de Esperanto. Indispensável a alunos e esperantistas.

Aparecimento provável em janeiro de 1978. Preço, sujeito a retificação: Cr\$ 100,00.

Redução, malpligrandigo; malpligrandaĵo.
Retocar, retuŝi.
Retrato, fotografiaĵo; portreto.
Revelação, rivel(ad)o.

S

Sensível, impresiĝema.
Sensibilidade, impresiĝemo.
Índice de —, impresiĝema indikilo.
Sincronização, sinkronigo.
Sombra, ombro.
Suporte, subtenilo.
 — para flash, fulmolampa subtenilo.

T

Telêmetro, telemetro.
Tripé, stativo; tripeĉa stativo.

V

Velada, vualita.
Velocidade, rapido.
Visor, celilo.

Z

Zoom, V. objetiva varifocal.

Popola rakonto de brazilaj indiĝenoj

La cervo diris: "Mi estas ŝargita de multa laboro, kaj tial mi tuj elektos bonan lokon por fari mian domon". Li ekiris sur la riverbordo, trovis bonan lokon kaj diris: "Tiu ĉi loko plaĉas al mi."

La jaguaro ankaŭ diris: "Mi estas ŝargita de multa laboro, kaj tial mi tuj elektos bonan lokon por fari mian domon." Li iris, kaj, venante al la sama loko jam elektita de la cervo, diris: "Kia bona loko! Tie ĉi mi faros mian domon."

La morgaŭan tagon venis la cervo, eliris la herbaĉon kaj zorge ebenigis la lokon. La sekvantan tagon venis la jaguaro kaj diris: "Tupan" (1) helpas min." Li starigis fostojn kaj ĉarpentis la domon. En la morgaŭo venis la cervo kaj diris: "Tupan" min helpas." Li tegmentis la domon kaj faris du ĉambrojn:

unu, kiun okupos li mem, kaj la duan okupos Tupan'. La morgaŭon, trovinte la domon jam preta, la jaguaro tien transloĝiĝis kaj elektis unu el la ĉambroj por dormi.

La sekvantan tagon la cervo venis kaj okupis la duan ĉambron. En la morgaŭo ili vekiĝis kaj, vidante la cervon, diris al li la jaguaro: "Ho, ĉu ja vi min helpis?" La cervo respondis: "Mi mem." La jaguaro diris: "Nu, se estas tiel, ni de nun loĝos kune." La cervo diris: "Nu, bone".

La sekvantan tagon la jaguaro diris: "Mi iros al la ĉasado. Purigu la domon, enportu akvon kaj brullignon, ĉar mi ja revenos malsata." Li ekiris al la arbaro, ĉasis grandegan cervon, ĝin alportis hejmen kaj diris al sia kunulo: "Preparu ĝin por nia manĝo!"

La cervo preparis sian samgentulon, sed lia koro funebriis; li ne volis manĝi, kaj nokte li ne dormis timante, ke la jaguaro ankaŭ lin kaptos. La morgaŭon la cervo siavice iris al la arbaro; tie li trovis grandegan jaguaron kaj, post kelkaj paŝoj, mirmekofagon. Li diris al la mirmekofago: "Tiu jaguaro, kiun vi vidas, klaĉas terure kontraŭ vi".

La mirmekofago tuj alpaŝis al la jaguaro, kiu ĝuste tiam akiris siajn ungojn gratante per ili arbitrunkon, senbrue alproksimiĝis, ĉirkaŭprenis la jaguaron de malantaŭe, enigis en lian koron sian akrepintan ungegon, kaj la jaguaro mortis. La cervo alportis hejmen la mortintan jaguaron kaj diris al sia kunulo: "Jen vi havas, preparu ĝin por nia manĝo!" La jaguaro pretigis sian samgentulon, sed ne manĝis: lia koro estis vualita de funebro.

Kiam falis la nokto, neniu el ili dormis: la jaguaro observis la cervon, la cervo gardis sub streĉa rigardo la jaguaron. Je noktomezo ambaŭ estis lacaj de tiu kontraŭstaro al la dormo; la kapo de la cervo ekfrapis la liton: ta! La jaguaro ekpensis, ke la cervo intencas lin tuj mortigi, kaj eksaltis kun granda bruoj. La cervo ektemis, kaj ambaŭ disforkuris en kontraŭaj direktoj.

Trad. Porto Carreiro Neto

(1) Tupan' estas la ĉefdio de la brazilaj indiĝenoj.